EKO
Esperiga Komuniko
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**

- AMO 69 – detala raporto
- Nordio – nun kaj estonte
- Landaj raportoj: SE, DK, FI, NO
- Tri kernaj diskuto-temoj

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-54 sendita el Budapeŝto, la 25an de novembro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

==========================================

# Renovigo kaj plijunigo de la skandinava komunumo

## Seminario de Norvega Esperantista Ligo (NEL); samtempe AMO 69

**Sabato, la 21a de novembro 2020. 15:00-17:00 CET**

Ĉeestis 37 partoprenantoj. (Plena laŭlanda statistiko mankas, sed rimarkitaj, aldone al NO, SE, DK: Belgio, Britio, Finnlando, Germanio, Hungario, Italio kaj Koreio)**.** Post la bonvenigo de la prezidanto de NEL, Stefan MacGill salutis la ĉeestantojn en la nomo de UEA kaj kiel gvidanto de AMO-seminario. Bård Hekland ekgvidis la seminarion.

### Prezento de Svedio (Puff Östling)

- Nova organiza strukturo de SEF – dividi la taskojn pli vaste – ne resti tiom multe ĉe la estraro. Evoluigo de retejoj kaj komunikaj rimedoj. Membreco por 12-monataj periodoj, ne plu kalendaraj jaroj. Fikso de kvin fokusoj por koherigi la diskutojn.
- Junuloj ne plu havas propran organizon, tiel ili ne devas administri kaj havi diversajn estrarajn funkciojn, sed povas fari mallongajn projektojn laŭplaĉe
- Reta renkontiĝo de aktivuloj ĉiuĵaŭde. Pretigo de retfilmo: 'Kiel prizorgi retejojn'
- Diskutejo ĉe <esperanto.se> evoluigeble por pli vasta kaj regiona uzado
- SEF delonge havas kaj havos fortajn retajn komunikejojn, kiuj povos servi por nordia kunlaboro.

### Prezento de Danlando (Peter Wraae)

- Transiro al nova oficejo, kunvenejo (sed restas en Kopenhago).
- Pro la translokiĝo oni devis ordigi kaj transdoni la dokumentojn al la nacia arĥivo, iuj libroj iris al reta biblioteko, restantajn librojn oni pretas forsendi al lokoj, kie ili povos utili.
- Regulaj kunvenoj (antaŭ la pandemio), ĉar la plej multaj membroj de DEA loĝas en Kopenhago.
- Ĉeestaj kursoj en du niveloj (tipa partoprenanto estas pensiulo, kiu serĉas hobion).

## Prezento de Finnlando (Tuomo Grundström)

- Post la sukcesa UK en Lahtio (2019) la jaro 2020 alportis malfacilaĵojn pro la viruso.
- Propra oficejo en la centro de Helsinki.
- En marto 2021 oni volas aranĝi renkontiĝon en Turku kie ĉiuj estas bonvenaj.
- Lokaj grupoj enHelsinki, Iisalmi, Oulu, Tampere kaj Turku
- La revuo *Esperantolehti* aperas kvinfoje jare, trilingva

## Prezento de Norvegio (Mario Machlik)

- La membronombro de NEL duoniĝis ĝis238,ene de 15 jaroj, sed oni daŭre havas la samajn servojn (oficejon, membrogazeton ktp.) por la membraro kiel tiam.
- Oni havas malmulte da homfortoj por novaj projektoj, ĉiuj fortoj iras por vivteni la organizon.
- La junulara organizo (NJE) havis 10 membrojn en 2019, sed certe multe pli da junuloj regas la lingvon.
- Kunlaboro kun la najbaraj landoj povus transpreni kelkajn taskojn kaj doni freŝajn impulsojn.
- Ses kluboj estas, el kiuj tri pli fortas – Oslo, Trondheim, Tromsø.

## Prelego, prezento (Stefan MacGill)

***La prezentaĵo estas alkroĉita al la nuna komuniko.***

## Diskuto: Perspektivoj por restarigo de sekcioj de TEJO

- Resuma prezento de lastatempe dissendita enketo: Bård Hekland
- Junuloj ne interesiĝas pri movadorganizaj taskoj
- Ili volas amuziĝi per la lingvo; gravas vojaĝsubvencioj por novuloj
- Asocioj devus okupiĝi ne nur pri siaj membroj, sed pri ĉiuj, kiuj interesiĝas pri E-o
- Oni devus aranĝi interesajn projektojn (renkontiĝojn, ekskursojn) kien eblas inviti junulojn (plej bone, se tion aranĝas kaj gvidas la junuloj mem)
- Reklamo (kaj uzado) gravas en Facebook, Twitter, Snapchat, ks.
- Fondaĵo anstataŭ tradicia asocio? - malpliigas administradon
- Junuloj moviĝas, translokiĝas ofte, mallonge povas partopreni lokan aktivadon
- Granda estas la diferenco inter junuloj kiuj aĝas 16-25 jarojn kaj la pli aĝaj «junuloj»
- Ĉiu havas en sia vivo pli aŭ malpli aktivan periodon pro ŝanĝo en la vivsituacio

## Diskuto: Perspektivoj por la refortigo de sekcioj de ILEI

- Ĉeestaj kursoj estas bone por amikiĝi kaj pro la socia etoso.
- Oni malfacile povas atingi la lernantojn de retkursoj, kaj ili ne estas interesitaj en la movado, pri la ideologio
- Oni rekomendas kursojn kiel SES kaj kurson en Gotenburgo (la avantaĝo estas la internacia etoso).

- Kontraŭ-argumento: Retaj kursoj povas esti same (eĉ pli) efikaj kiel ĉeestaj kursoj kaj oni povas esti en diversaj lokoj. Hungara lernejo devis transigi sin de surloka al virtuala instruado, kun tiu rezulto.
- ILEI povus aparte informi pri tio, kiel instrui (organizi kurson) en virtuala klasĉambro.

## Diskuto: Perspektivoj por antaŭenigo de la Nordia movado kaj komunumoj



- Oni estas pozitivaj pri plua kunlaboro kaj esploris eblojn por tio.
- La tria skandinava kongreso estas nuligita en 2021, sed oni havas planojn organizi ĝin samloke en 2022 en la dana havenurbo Helsingør.
- Ni devus daŭrigi komunajn virtualajn renkontiĝojn kaj ni pripensu kiel, kaj kiom ofte organizi ĝin – por tio estas formita kvarpersona kvarlanda laborgrupo.
- Komuna skandinava revuo povus esti bona ideo, sed malfacile organizi redaktadon, kaj ĝi ~~devus~~ povus esti retgazeto por eviti sendokostojn.
- Verŝajne pli bone estus uzi komunan retejon (nordio.org) kun ligiloj al la landaj asocioj kaj reklamoj pri komunaj aranĝoj, do Nordia kalendaro.
- Oni povas uzi tra Nordio la diskutejon ĉe SEF kaj pliajn retrimedojn, kiuj jam ekzistas.
- NEL kaj SEF havas jam interkonsenton pri interŝanĝo de la membrogazetoj. (La membroj de NEL ricevas rete la svedan membrogazeton kaj inverse.) Larĝigebla al la tuta Nordio.
- Finnlando estas tre bonvena al la kunlaboro (ne parto de Skandinavio!), ni provu kontakti Islandon.




- Pledoj estis por reaktivigo de la kultura festivalo KEF, la fondo de nordia versio de la slovaka SES – ĉefe por doni al retaj lernintoj la okazon akiri parolkapablon kaj emon,kaj realigo de Lingvaj Festivaloj (Språkfest).

Sur la foto: la etoso de KEF – fakte sceno el la sveda Esperanto-centro en Lesjöfors.
Foto: SMG

Post la fino de la seminario kelkaj daŭrigis la babiladon dum duona horo. La norvegoj jam dissendis enketilon al la partoprenintoj.

============ vortoj: 860 ==========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.